

ESPERANTO

★ TRIUMFANTA ★

Internacia

SEMAJNA

Neŭtrala

Abonon ĉiu pagas laŭ la taga kurzo de sia propra valuto, se eble per ŝtataj monbiletoj en rekomendita letero, aŭ per ĉeko, sed ne per poŝtmandato. — Abonantoj, kies abono estas finiĝonta, ricevas ĝustatempe **admonilon**. — Abonoj povas esti komencataj per iu ajn numero.

Por **Abono** oni sendu laŭvole altan sumon, kaj ni liveros tiom da numeroj, por kiom valoras la pago. — **Prezo de unu numero:** 0.06 dolaro, 0.15 guld., 0.24 sved. kr., 0.30 svis. fl., 0.30 dana aŭ norvega kr., 0.30 peseto, 3/2 penco, 0.50 fr. aŭ belg. fl., 0.70 lito, 1.20 fmk., 1.40 ĉ. kr., 6 germ. mk. (por baltaj kaj balkanaj ŝtatoj), 3 germ. mk. (por rusoj), 10 hung. kr., 50 pol. mk., 200 aŭstr. kr.; internacie 1 respond-kupon.

Por adresŝanĝoj ni kalkulas la prezon de 3 numeroj. — Liston de niaj **Abonejoj** en diversaj landoj — vidu sur paĝo 41. — Germanoj abonu nur ĉe sia poŝtoŭficejo (kvaronjare 48 mk.); senpera alsendo sub banderolo — kostas por germanoj po numero 7 mk.

GE-

Knabojn ni atentigas pri la konkurso anoncita en „**Esperanto Triumfanta**“, n.º 94.

ELDONANTOJ:
D-ro L. Zamenhof, Warszawa (Varsovio)
W. M. Page, adv., Edinburgh
Ernest Archdeacon, Paris
J. Gili Norta, Barcelona
Teo Jung, Köln (Kolonjo)
Frans Schoofs, Antwerpen
P. v. Medem, bankdirektoro, Kaunas (Kovno)

REDAKTOROJ:
Ĉef-redaktoro: Teo Jung.
Kun-redaktoro: M. Buijn.
Feliĉona red.: Zanoni.

ADMINISTREJO:
Horrem bei Köln, Germ.
Poŝtekonto Köln 70863, por Teo Jung, Horrem.

ANONCOJ
po cm² 0.10 svisa franko (aŭ ĉe antaŭpago 10 gmk.)
Rabato laŭ interkonsento.

Numero 97 :-: Antwerpen, Barcelona, Edinburgh, Kaunas, Köln, Paris, Warszawa :-: 13. Aŭgusto 1922.

II-a Rumanlanda Kongreso grandsukcesa.

CLUJ, la 8-an ĝis 11-a de julio 1922.

Reĝino Maria salutis, s-o D-ro C. Angelescu, Ministro de Publika Instruado, kaj s-o C. Banu, Ministro de Kultoj kaj Artoj, protektis.

Post dektriara silento la rumanlandaj samideanoj denove altlevi la verdstelan standardon jam gaje flirtantan por sukcesoj rimarkindaj.

Nur „landa“ estis la nomo de nia nuna kongreso, sed konsiderante, ke ĝin multnombre partoprenis ne nur rumanoj, sed ankaŭ hungaroj, germanoj, bulgaroj, rusoj kaj amerikanoj, — ni povas ĝin nomi internacia kongreso, kies ĉarmaj rememoroj longe floros en niaj koroj.

Ke nia agado ne estis senefika, tion plej evidente pruvos, se ni citos la gazetoj pri kongrese raportojn. En la ĉefurbaj gazetoj: „Dacia“, „Universul“, „Adevarul“, „Lupta“ kaj „Aurora“ aperis grandaj artikoloj. La provinca gazetararo ankaŭ multe sin okupis pri nia afero, sed plej precize skribis la loka gazetararo, kies redaktoroj ĉeestinte „Nian Duan“, povis tute objektivaj raporti. Unu artikolo de „Patria“ priskribis la malferman solenan kunvidon, alia artikolo raportis pri laborkunsendoj kaj citis ankaŭ jenan telegramon senditan de la kabineto de la reĝa kortego al s-o Pastro Andreo Ĉe, prezidento de la kongreso, kiel respondon al nia salutotelegramo:

„**Sia Reĝina Moŝto, flatita per la aldirekto de viaj pensoj al ŝi, sendas al vi sincerajn bondezirojn por la sukceso de via agado porpaca kaj altruista.**“ —



Organiza Komitato de la II-a Rumanlanda Kongreso.

Ĉi loke ni citas ankaŭ la telegramon de s-o Banu, ministro de kultoj kaj artoj:

„Mi tre bedaŭras, ke la 9-an de julio mi ne povos esti en Cluj, retenote de miaj neprokrasteblaj oficialaj devoj, — sed mi deziras fruktoričan sukceson al la laboro, kaj mi esperas, ke via agado kunhelpas eduki homaron pli bonan.“ —

Jena telegramo alvenis de s-o D-ro Angelescu, ministro de la publika instruado:

„Dankante vin pro la varmaj vortoj, mi petas miajn dankojn kaj bondezirojn transdoni al la partoprenantoj de la kongreso.“

La „Keleti Ujság“ (Orienta Gazeto), plej grava hungarlingva gazeto de la lando, per Esperantlingva ĉefartikolo salutis la kongresanojn. Jen parto el ĝi:

„Vin, kiuj venis por krei feliĉan harmonion en la kaoson tragikan de Babilono, vin Esperantistojn de ĉiu lando ni alsalutas! Vi estas la unua nacio, en kiu sin nomas gefratoj tiuj, kiujn la kasto, religio, partioj, rasoj disigas. — Neniam oni estus povinta partoprenigi en blinda detruo la admirindan mekanismon de la menso, se la ĉirkaŭprenanta ĉielarko de la komuna lingvo estus transarkinta la prudentan konkuradon de la ĝepatraj lingvoj! Sur via vojo oni alproksimiĝas plej baldaŭ al la suno — Ni deziras al vi bonan laboron!“

VERDA FELIETONO:

Tra mia fenestreto.

I.
Mia kurteno. — Malgrandulo poŝtmarka. — Flirtemulnieto. — Lokomotivo eluzita. — Ambrozio kaj nektaro. — Malfermo. — Blindeco kaj senhonestaj atakoj. — Sola.

Vere tra ĝi la elrigardo estas mirinda!
„Senkurulo! Kial vi ne volas permesi ankaŭ al ni rigardi? Nur unu irarigardon, nur unu!“

Bone, mi ne volas esti tiel kruela, mi permesos al vi irarigardi tra mia fenestreto... Tuj. Nur paciencon!...

Ni devas suprentiri unue la verdan kurtenon. Vi miras pri ĝi? Mi kredas, mi kredas, ĝi estas tre bela kaj eleganta. Sed la ĉefa boneco, kiun ĝi havas, estas ĝia densega maldifano... Jes, maldifano.

„Maldia famo?“
Pardonu, ke mi skuas malaprobe la kapon. Ke vi tian aferon povas supozi pri mia bela kurteno! Sed vi malkomprenas min pro tio, ĉar vi ne lernas bone Esperanton! Alie vi tuj scius, ke „difano“ estas similsignifa kun „travidebla“. Sed vi opinias, ke sufiĉas, se vi scias „bonan tagon“ kaj „ĝis revido“... vere vi ne meritas rigardi tra mia fenestreto! Do, mia verda kurteno estas maldifana. Kaj mi devas konfesi al vi, ke mi tre ĝojas pri tio. La kurteno estas kvazaŭ dika muro, kiu min protektas. Kontraŭ kiu? ... Ho, vi vidos kaj spertos mem la agrablegon de tiu muro... atendu nur!

He, malgrandulo! Kial vi estas tiel scivola? Lasu, mi petas, lasu la suprentirilon en paco! Viaj malgrandaj fingroj ja tamen ne sukcesus suprentiri la verdan kurtenon, ĉar ili ja apenaŭ scipovas skribi en Esperanto: „mi kolektas poŝtmarkojn“.

Jes, se ili kapablas skribi longajn leterojn senere, ili estus pli fortaj...

Kaj vi, fraŭlino? Viaj amemaj okuloj kaj dancemaj piedetoj perdas vin, ke vi vizitas la Esperantajn kursojn kaj kunvenojn pro „aliaj kaŭzoj“, kiujn mi ne volas speciale klarigi al la aliaj ĉeestantoj... pro tio, ke ili ĉiuj jam estas bone informitaj. Ne, ankaŭ vi ne sukcesus suprentiri la verdan kurtenon...

Ne penadu, sinjoro! Vi estas jam tro malluna por havi la sufiĉan forton. Eble vi sukcesos duone suprentiri mian kurtenon. Vi estas unu el la „malnovaj kaj antaŭmilitaj“? Sed viaj ideoj estas jam iomete — pardonu la akran esprimon — antikvaj. Kaj viaj proponoj, kiujn vi faras dum la kunvenoj koncerne statutojn kaj propagandon, estas jam malmalmodernaj. Kaj ĉu vi ne samopinias, ke estas plej urĝa tempo novpari la verdan cerban parolmaŝinon, kiu haltis dum la tuta milito, koncerne rapidan kaj perfektan laboron? Vi ne volas kredi? Ĉar mi estas nesperta samideano? Hm, certe mi estus tia, kia vi opinias min, sed vi forgesas, ke mi posedas fenestreton kun verda kurteno...

„Sed mi, mi, mi!“
Mi petas silenton! Se vi faros tioman bruon, mi tute ne permesos al vi hodiaŭ rigardi tra mia fenestreto. En tiaj aferoj mi ne ŝercas. La verda kurtena afero estas al mi tro serioza, ke mi povus toleri tiajn krakadojn, kiuj malebligas kaj forigas ĉian senteron da soleno, kiun ĉiu el vi devas senti antaŭ la grava momento, kiam la verda kurteno levigos!

Vere, solena estas tiu momento, solena kaj grava. Kaj vi ne konscias tiun solenan gravecon... Paciencon! Silenton! Antaŭ ol mi suprentiros la verdan kurtenon kaj malfermos la fenestreton,

Pri la kongreso jene raportis la sama gazeto („Keleti Ujság“):

En la belornamita prefektejo kunvenis tricent enlandaj kaj proksimume cent eksterlandaj Esperantistoj. En la unua vico ni vidas vigan grizharulon, delegiton de Ĉikago, D-ron Simonek, reprezent. de Nordamerika Esp. Societo. — Inter nigraĉemiza, flirihara bulgara samideanaro staras s-o Minkov, Esp. lektoro de la teknika ĉeflernejo en Sofio (Bulg.). — Entuziasme parolanta junulo alportis la lumon de la aziaj ebenaĵoj: li estas la turkestana delegito. Ĉeestas centoj da diverslingvaj homoj interparolantaj per mirinde flua Esperanto. —

Oni elektis kiel prezidantojn je la propono de s-o Vándor: S-ojn pastron A. Ĉe kaj advokaton D-ron L. M. Câmpianu. Vicprezidantoj estis: S-oj Simion Miluta kaj majoro A. Hasenöhrl. Sekretarioj: Profesoro G. Cornea, J. Wollheimer, L. Löcsey, T. Morariu. Protokolistino: Terinjo Barabás. — Oni per ekstaro honoras la memoron de mortintaj gesamideanoj: de reĝino Carmen Sylva, protektintino de la Rumanl. Esp. Societo, D-ro Robin, D-ro Teodorescu kaj Otto Amon. —

Dum la salutparoladoj aperis la bulgara delegitaro ius alveninta per vagonaro Bukureŝta. Ili multnombra ekapero vekis grandan entuziasmon. Iliajn gvidantojn oni tuj e'ektis honoraj membroj de la prezidantaro.

Pervorte salutis la kongreson D-ro Simonek, je la nomo de amerikaj kaj ĉeĥoslovakaj Esperantistoj, s-oj Prof. Minkov kaj Simeonov je la nomo de Bulgara Esp. Societo, kaj la delegitoj de diversaj landoj kaj enlandaj urboj. Tre rimarkindaj estis la paroladoj de: Senatano E. Balázs, ĉefparolostro G. Szabo. Belparolisto pastro franciskana s-o V. Darvas kaj entuziasmige terkulturisto G. Bărsan, Pipu. S-o majoro Hasenöhrl mallonge, sed tre saĝe instigis por serioza, senlaca laboro. —

La Klujan movadon kaj antaŭkongresajn okazintaĵojn skizis la klubsekretario Tiberio Morariu, danke menciante la nomojn de bankdirektoro s-o J. Halász kaj pastro A. Ĉe por ilia plejdorna pionira penplena laboro. Poste s-o Morariu parolis pri Esp. kaj pacifismo: „Oni diras pri Esperantistoj, ke ni sekvas utopion, sed tio nin ne malhelpas en la plua, eĉ pli entuziasma agado. La sangruĝkolora suno de la mondbuĉado jam malleviĝis, la armitoj kuŝas en ombro. Sur la ankoraŭ griza horizonto ekaperis verda stelo, kies radioj prilumas tute malajn ilojn: plugilon, martelon kaj plumon. Ni forgesu la ĉiutagajn zorg-

mi devos informi vin pri la signifo de ĉi tiu fenestreto en pli longa parolado. Aŭskultu!

Saluton al vi, kunvenintoj el plej diversaj landoj! Saluton kaj bonvenon al vi, reprezentantoj de diversaj nacioj! Saluton al vi, kiuj sukcesis trovi la vojon al mia fenestreto! Dankon al vi pro via penado! Longa estis la vojo por multaj el vi. Sed mia fenestreto rekomencos al vi miloble ĉiujn pensojn kaj malagrablaĵojn, kiujn vi havis. Ĝi refreŝigos vin post via longa vojaĝo tulkorpe! Ĝi surtabligos al vi bonegajn mangajaĵojn kaj dolĉajn trinkaĵojn en riĉega amaso! Kaj via verda stomako, kiu krakas pro malsato kaj soifo, ekĝojos kaj ĝuos! Tiu gastronomo stomako, kiu malsatis kaj soifis dum longa tempo, postulante verdajn ambroziojn kaj nektaron kun grandega avido, estos kontentigata! Mia fenestreto garantias al vi ĉi tiujn verdajn ambroziojn kaj nektaron, kiujn vi ĝis nun vane serĉadis! Feliĉaj vi estas, kiuj trovis la vojon al la neelĉerpebla fonto de verdaj ĝuaĵoj. Tiu tonto sanigos vin kaj plifortigos vian energion kaj obstinan volon, ĝi kreos iom post iom el vi verajn verdulojn.

Eble kelkfoje la nektaro, kiun vi devos trinki, ne bone gustos al vi, kaj vi murmuros malkontente. Kaj plej taŭte murmuros tiuj el vi, kiuj estas plej malsanaj kaj malfortaj. Ĉar malsanaj vi estas ĉiuj — unu pli, alia malpli! Sed la nektaro estos kuracilo, kiu resanigos vin. Kaj vi ĉiuj bezonas tiun kuracilon plej urĝe. Mi ne postulos de vi monon por ĝi. Mi donos ĝin senpage kaj volonte!

Venu, venu grandare! Kolektiĝu ĉe tiu verda saniga fonto, kiu estas mia fenestreto! Kaj nun atentu kaj rigardu!...

Mi suprentiras la kurtenon kaj malfermas la fenestreton.

etojn, kaj ni senlace laboru por nia alta idealo: mondpacol! (Aplaudego.)

Poste ekparolis s-o D-ro Calugareanu, rektoro de la Universitato en Cluj. Li konstatis, ke Esp. estas bonega ilo ne nur por lingva interkompreno, sed ankaŭ tial, ke ĝi alportas fratigan spiriton inter la diversajn naciojn, kiuj slajn kulturojn tre facile povos interŝanĝi kaj per ilio utiligi al tut-homaro. Li kredas, ke estas necese enkonduki Esperanton en ŝtatajn lernejojn.

Sekvis la reorganizado de la Rumanl. Esp. Soc., por kies gvidado oni elektis komitaton konsistantan el s-oj A. Ĉe, J. Giuglea, S. Miluta (el Bukureŝto), D-ro L. M. Câmpianu, T. Morariu, Prof. Cornea, F. Engelman (el Cluj), majoro A. Hasenöhrl (el Bukovino). —

Dimanĉespere okazis bonsukcesinta koncerto en la Prefektejo. Tre plaĉis al la publiko la deklamado de s-oj artisto Ladislao Löcsey kaj F. Engelman — Lunde posttagmeze vnggrandkomercisto s-o Elian gastigis la kongresanaron per vinoj bonegaj. Okazis ankaŭ piedpilka vetludo de landfamaj trupoj „K. A. C.“ kaj „Hagibor“ por Esp. propaganda fondo. Vespere estis bankedo kaj balo. Marde oni forveturis al postkongresaj ekskursio al Bukureŝto — Konŝtancia. — La kongreso komisiis la gvidantaron por fari vizitajn ĉe la registaro kaj transdoni al kompetentaj ministroj memorandojn pri enkonduko de Esperanto en lernejojn kaj pri malaltigo de aŭfranko ĉe poŝtaj Esperantoj. —

Multe skribas pri la kongreso la Klujaj: „Infratirca“ (Interfratigo), „Ellenzék“ (Opozicio) kaj „Bécsi Magyar Ujság“, hungara gazeto Viena. —

Nun ni dankas al tiulanda eminentularo pro ilia altvalora morala helpo kaj al Klujaj urbestro ankaŭ pro malavara subieno. Ni dankas salutleterojn kaj telegramojn are venintajn el tuta Esperantujo, ankaŭ de nia kara ET, — senlaca propagandiston d-ron Simonek (el Ĉikago), — la bravajn bulgarajn gefratojn, multmeritajn en la kreo de vere en ernidea atmosfero. Specialan dankemon elvokas la aranĝintoj heroe batalintaj kontraŭ malfacilaĵoj neantaŭviditaj (pro samtempaj kongresegoj ŝtatoficista kaj minlaborista kun 2000 anoj). Dankemaj koroj ne forgesos la bravan laboron de s-o Löcsey („diktatoro“ loĝeja), f-ino Genjo Morariu, farintino de la verda flagaro arto-plena, senlaca samideanino Ilono Stangel (dumkongrese edziniginta), sekretario, kasisto s-o Wollheimer, s-o skulptisto E. Hirsch, artfarinto de

Ha, kiel scivole kaj avide rigardas viaj okuloj! Mi scias antaŭe, ke vi estos ravita pri la mirindaĵoj, kiuj estas videblaj tra mia fenestreto.

Jen la belega lageto inter la montoj kaj la speguliganta suno! Kaj jen la muĝanta arbaro! Ĉu vi vidas tiun belegan bildon?

„Ha, ha, ha! Nenion ni vidas, nur altan domon kaj strataĉon, ĉe kiu vi loĝas! Tia trompanto kaj mensogulo! Batu lin! Batu lin!“
For! For el mia domo! Forlasu la ĉambron! Vi estas blinda... ĉiuj blindaj! Kion? Vi mokfajfas kaj frapas per la piedoj?

For, mi diras! Vi, blinda bando!
„F-s-s-s-paĉ!“

Ha, vi jetas putrajn pomojn kaj ovojn? Ĉu vi estas frenezaj? Ho ve, ke mi malŝparis mian tempon por tiaj homaj kreaĵoj, ke mi ilon ne antaŭvidis, mi komatindu'ol! —

Mi estas sola.

Bone, ke ili forlasis min. Denove mi spertis, kiel maldankemaj kaj senhonestaj estas la homoj. Ha, ili nomas sin Esperantistoj, kaj kiam mi lasas ilin rigardi tra mia fenestreto, ili subite blindeĝas.

Ne, ne! Mi juras, ke mi neniam permesos plu al ili rigardi tra mia fenestreto! Ili tion ne meritas.
Sola mi rigardos tra ĝi, sola mi ĝuos! Sola mi manĝos la ambroziojn kaj trinkos la nektaron. Solaj ni ĝojos... mi kaj mia gastronomo stomako. Kaj ili? Ili plu vegetu, kiel ili vegetis ĝis nun. Mi volis dividi kun ili — ili mokfajfis! Mi volis surtabligi al ili belajn — ili jettis kontraŭ mia senkulpa kapo putrajn pomojn kaj ovojn! Mi peris silenton — ili bruegadis kaj frapis per la piedoj!

Ne, ili vere ne meritas. Sola mi rigardos! Sed hodiaŭ estas jam tro malfrue por rigardi.

busto de l' majstro, s-oj Botár kaj Jakab (aranĝintoj de balo kaj koncerto), s-oj Gluglea kaj Miluta, multklopdintaj karavanestroj sindonaj kaj de la ceteraj kunhelpintoj modestaj sed multmeritaj. Gis revido en Timiŝurbo!

Antaŭkongreso en Lübeck 3.—5. aŭg.

Ĉe partopreno de 228 samideanoj okazis la antaŭkongreso en Lübeck. Jam 16 popoloj estis reprezentitaj, do sufiĉe, por nomi ĝin Internacia. Jaŭdon vespere oni kunvenis en „Marmorsaal“ por aŭskulti publikan paroladon de nia konata fervora D-ro Steche el Leipzig. Unue salutis D-ro Möbusz germanlingve kaj Esperante la ĉeestantojn kaj akcentis, ke per Esperanto multaj homoj en ĉiuj partoj de l' mondo estas atentigitaj pri Lübeck, ĉi tiu malnova grava komercurbo de Germanujo. D-ro Steche diris, kial li nur pro praktikaj kaj komercaj kaŭzoj lernis Esperanton. La komercistaro uzu kuraĝe Esperanton, kiam la propra lingvo ne sufiĉas. Fremdaj naciaj lingvoj estu la laste uzata interkomprenilo. Poste senatano Henze salutis la kongreson nome de la senato kaj s-o Sievers nome de la porfremdula asocio. D-ro Möbusz interpretis Esperanton la salutarolojn, same kiel germanen tiujn de la reprezentantoj el la diversaj fremdaj landoj.

(Ni nur en la lasta momento ricevis sciigojn pri Lübeck. Pli detalajn raportojn ni donos en venonta numero.)

La graveco de la malgrandaj nacioj.

En sia parolado en Londono dum la Brita Kongreso D-ro Privat diris, ke la ĉefgrava afero, kiu decidis la sorton de Esperanto, estas la sinteno de la grandaj nacioj, ekz. la brita. La vero ŝajnas al mi tute la kontraŭa. Mi konsentas ke, se la grandaj nacioj oficiale aprobus Esperanton, tio estus jam sufiĉa por certigi ĝian ĝeneraligon; sed la grandaj nacioj, aŭ almenaŭ la registaroj de tiuj landoj, estas ĝuste tiuj, kiuj ankoraŭ ne sentas la bezonon de lingvo internacia. Ĉiam ankoraŭ ili estos kontentaj oficiale ignori Esperanton, pretendante ke oni ne uzas ĝin multe sur la kontinento. Sed lasu nur du-tri malgrandajn kaj sensignifajn landojn oficiale ĝin akcepti, kaj jam la gravaj nacioj ne povos plu ignori ĝin. La ŝtatestroj kaj registaraj administrantoj tiam konstatis, ke Esperanto estus fakte agnoskita*, kaj ilia propra agnosko je ĝi estus nur afero de kelka tempo. La Esperantistoj en la malgrandaj landoj devus insisti, ke la bezono de lingvo internacia estas ĉefe sentata en la malgrandaj landoj, kaj pro tio Esperanto devas esti akceptata tie unue, kaj ke, tuj kiam oni grand-skale instruos ĝin en la malgrandaj landoj, la politike influaj landoj komencos sin interesi pri la afero.

Jen kial la decido de la Albania registaro instrui Esperanton devige en lernejoj ŝajnas al mi tre grava. Cetere, ni ricevis bonegan komplimenton de la Franca Ministro de Edukado per lia letero malrekomendanta nian lingvon.

P. J. Cameron, Londono.

*) angle „recognized“. Mi tute ne ŝatas la vorton „agnoski“, sed ĝi estas la sola vorto uzata por tiu-senco. Persone mi preferas „rekogni“.

La konkurso por infanoj.

Jam kelkaj infanoj sendis skribaĵojn laŭ la kondiĉoj sciigitaj en ET n-o 94. S-o van Heek sciigos iliajn adresojn al la firmo Butin & Jung en Godesberg, kaj ĉiu infano rajtos elekti librojn el la stoko de B. & J. en valoro de 150 germ. markoj (ne 75 gmk., kiel sciigite en n-o 94). Do, infanoj

Fenestreto fermiĝu kaj verde kurteno malsupren-tiriĝu.

Hodiaŭ mi ne plu rigardos.
Eble alian fojon...

BUBAĈO.

II.

En Lübeck. — „Helgoland“. — La sinjoro kun la kesto. — Esperantujo. — Al Helsinko. — „Indiferento“, eltrovaĵo de l' jaro 1922. — Korŝira sciigo.

„He, sinjoro!“

La laboristo, kiu paŝas antaŭ mi, returnas sin kaj diras:

„Kion vi deziras, sinjoro?“

„Pardonu! Ĉu vi povas diri al mi, kion signifas ĉi tiu ŝipo kun la sennombraj flagoj kaj flagetoj?“

Li rigardas min kun miro.

„Vi tion ne scias?“

Poste li montras per la mano kaj diras:

„Rigardu! La ŝipo nomiĝas „Helgoland“ kaj ĝi forveturos post duona horo.“

„Kien?“

„Al Helsinko kompreneble.“

„Kial, kompreneble?“

„Ĉar ĉiu infano scias, ke la Dekkvara okazas en Helsinko.“

„A — la Esperantokongreso!“ mi krias ekscite kaj ekprenas lian brakon. „Diru, diru...“ Sed li forpuŝas min kolere kaj elkraĉas.

„Iru for kun viaj bagatelaj demandoj!“ li diras kaj daŭrigas trankvile sian vojon.

Hop! Preskaŭ mi estas falinta en la akvon. Kaj mi ne scipovas naĝi. Terura afero! Se mi pripensas, ke mi dronos? Kaj mi devus trinki tiun salan akvon... kaj fine mi perdis la konscion kaj mortus... kaj mian morion kaŭzus Esperanto! Kaj ĝuste antaŭ la forveturo de la

ĉiulandaj, rapide! La unue skribintoj ĝuos preferon! Sendu viajn skribaĵojn tuj al la adreso de s-o G. van Heek, Steynstraat 72, en Hengelo, Nederlando! Sed bone atentu la kondiĉojn sciigitajn en ET n-o 94!

Jen ni publikigas kelkajn infanleterojn jam ricevitajn, kies verkintoj rajtas elekti librojn laŭ la ĉi-malsupra listo en valoro de 150 gmk. La leterojn ni represas laŭ la originalo, t. e. ni ne korektis eventualajn erarojn.

1.

Pri mia Esperanto.

En la lasta jaro volis mia patro, ke mi kun mia 8jara fratino devas lerni Esperanton. Mi estis 10jara. Ni serĉis nin ankoraŭ kelkaj geluduloj kaj havas nun malgrandan kurson de 7 personoj. En tiu-ĉi kurson ni lernis ĉiuj deligente,



El la lando de la XIV-a: Tagmanĝo okaze de edziĝofesto en finna bieno.

ankaŭ mia patro, kiu ankoraŭ estas komencanto. Unue ni havis lernlibron. Nun ni jam tradukas el la gazeto „Esperanto Triumfonta“, poste ni rakontas pri la bildoj el la libro de „Thora Goldschmidt“, laste ni kantas belan liedon.

Ni lernos tiel diligente Esperanton, ĉar ni esperas, ke Esperanto eniros en la lernejoj, por ke ni ĉiam kun unu „1“ venos helmen. Se mi ricevos libron, tiel komencos ni por nia kurseto bibliotekon.

Via sindonema
W. B. en E.

(Aĝo de la skribinto: 11 j.)

2.

Temo: Kiel mi lernis Esperanton kaj kiel mi varbis por ĝi.

En la jaro 1920 mia onklo el W., kiu estas fervora Esperantisto, venis al Tr., por resti pri la libertempo, ĉe ni. Ĉar mi estas kolektanto de poŝtmarkoj, li donis al mi multajn belajn markojn el diversaj landoj de la mondo. Je mia demando: „De kie vi havas la belajn markojn?“, li respondis: „Mi ricevis ilin per Esperanto.“ Esperanto?? Mi ne scias, kio estas tio. Nun li rakontis al mi de la Majstro, de ties verko, de la facileco

de Esperanto k. t. p., ke mi ricevis grandan interreson por ĝi. Sed mi ne havis okazon lerni la lingvon internacian. Pro tio, mia onklo sendis al mi, kiam li ree estis en W., lernolibron de Esperanto verkita de Glück kaj Sos. Mia patro kaj mi nun komencis lerni. En septembro, s-o inĝeniero Sch. el R. faris en nia loko varbparoladon. Ĉar ĝis nun en Tr. Esperanto estis nekonata aĵo, multaj homoj vizitis la tre interesan paroladon. Preskaŭ 70 gevoj anoncis sin al estonta kurso. Sed kiel estas ĉiam, je la fino de la kurso nur restis 25 personoj, sub ili ankaŭ mia patro kaj mi. En aprilo 1921 ni fondis nian „Esperantan Grupon Tr.“. Mi korespondis jam longe kun samideanoj el diversaj landoj, p. e. Hispanujo, Britujo, Francujo, k. t. p. De tie mi ricevis poŝtmarkojn kaj ilustritajn poŝtkartojn. La poŝtkartojn mi uzis pli malfrue kiel varbmateriale. Kiam mi venis la unuafoje kun la verda stelo en la lernejo,

profesoroj kaj gekolegoj demandis, kio signifas ĝi. Aŭdantaj mian respondon: „Ĝi estas signo de la internacia mondhelplingvo Esperanto, ĉiuj pensis, ke mi estas freneza. En bela interkonsento diris profesoroj kaj lernantoj: „Vi ne estas tre saĝa! Lernu la francan, anglan aŭ ĉeĥan lingvon, kiuj vi bezonos en via vivo, sed ne Esperanto, kion nur parolas verŝajne la Hotentotoj kaj la Kanibaloj, sed ne prudentaj homoj!“ Mi estis nomata „So Bonan Tagon“, ĉar kolego vidis kaj aŭdis, kiam mi salutis samideanon. Sed baldaŭ vidis profesoroj kaj kolegoj, ke Esperanto ne estas sporto por mi. Mi montris nun en la lernejo la leterojn, kiujn mi ricevis de eksterlandaj Esperantistoj, plenaj da poŝtmarkoj kaj poŝtkartoj. Nun komencis du el la plej bonaj lernantoj lerni nian lingvon. Tio estis la unua puŝo kontraŭ la pensoj de miaj gekolegoj. Kaj kiam mi montris en la lernejo serion da poŝtkartoj el Ĉinujo, ĉiuj demandis: „Ĉu vi ne scias okazon lerni Esperanton en mallonga tempo, por ke ni ankaŭ povos korespondi?“ Mi diris tion al So Otto L., gvidanto de la „Informejo por Orienta B.-lando“, kiu malfermis du kursojn por gestudentoj, ĉar ankaŭ el aliaj klasoj multaj lernantoj volis lerni. Hodiaŭ en nia grupo estas tiel multaj studentoj, ke ni baldaŭ fariĝas „Junul-

aran grupo“-n. Ankaŭ multaj profesoroj lernas Esperanton. Oni vidas: „Malgrandaj kaŭzoj havas grandajn efikojn“.

H. St., gimnaziano en Tr.

(Aĝo de la skribinto: 14 j.)

3.

Vesperpaco.

La vespera naturo estas silenta kaj pacema. Neniu aereto movas sin. Nespirante mi staras meze de belega naturo inter ondigaĵaj grenaj kampoj kaj floraj herbejoj. Alaŭdo sinigas vian vesperkanton en la nenubatan ĉielon. Mem la aliaj birdoj ne ĝenas ĝin en via kanto Finiginte, la aliaj ĝojegas kun ili.

Mi iras en la vesperan arbaron. La sciuro havas sian neston en la branĉoj de arbo. Nun ĝi sidas trankvile antaŭ sia dometo kaj komsumas mangas kontente avelon. Kapreolo vidas singardeme el la alia angulo de arbaro. Rimarkante min, ĝi trolis en la arbaron. Subite leporo preferuras dense de mia flanko. Mi sidas min sur arbostumpon kaj rigardis ankoraŭ unufoje en trankvilo la belegan arbarloketon. Nun mi pretiĝas al la reiro. Mi iris alian vojon hejmen. Survoje mi ankoraŭ vidis multajn belajn. Soleca abio staras ne malproksime de la vojo ĉe la arbarorando. Kiel domaĝe, ke vi, bela arbo, tiel forgesse staras ĉi tie. La suno malleviĝas malproksime en horizonto. Ĝi sendas ĝiajn lastajn sangruĝajn lumradiojn super la paca naturo.

Mi alvenas je la malfrua vespero kontente kaj feliĉe en mian vilaĝeton.

H. L., popollernejano en E.

(Aĝo de la skribintino: 13 j.)

Listo de libroj

el la stoko de Butin & Jung, Godesberg, Germanujo, kiuj estas speciale rekomendindaj por infanoj.

(La prezoj tenas la sendkostojn kaj validas por ĉiuj landoj; sed nur por la infanoj partoprenantaj en la konkurso.)

Gmk.
Andersen, Bildolibro sen bildoj... 27.—
Brüggemann, Unua Legolibro... 20.—
Christaller, Novetoj el la Nigra Arbaro... 7.50
Fricke, Universala legolibro (tre rekomendinda) 50.—
La lastaj tagoj de D-ro Zamenhof (ilustr.) 50.—
Moebusz, Dokumentoj de Esperanto... 50.—
Privat, Karlo (tre alloga legajo)... 10.—
Seidel, Vintro-fabeloj (ĉarmaj rakontoj)... 25.—
William, Legolibro (interesaj epizodoj)... 15.—
Zahn, Svisaj rakontoj... 12.50

Por pli aĝaj infanoj.

Argus, Pro kio? (Kriminalromano)... 32.—
Avsejko, Fraŭlino Suzano (Bela novelo) 17.—
Lessing, Minna von Barnhelm (klasika verko) 25.—
Raabe, La nigra galero (majstroverko)... 32.—
Vazov, Bulgaraj rakontoj... 8.—

Kelkaj vortoj pri la gazet-fonda febro de Esperantistoj.

(Rim. de Red.: Tiu ĉi artikolo estas verkita jam antaŭ kvin monatoj kaj ne aperis ĝis nun pro manko de loko.)

Jam antaŭ la milito mi skribis en niaj gazetoj pri tio, ke ni ne fondu senbezone novajn gazetojn kaj por nia movado estas pli profitdone, se ni havas nur kelkajn, sed gravajn gazetojn, kiuj per amplekso kaj multnombro akiras la atenton de la ne-Esperantistoj kaj ŝajnas profitdona por eldonistoj kaj por komercaj kaj aliaj reklamoj. Mi do devas grandparte apogi la tiurilatan artikolon de la redaktisto de ET en n-o 70 kaj atentigi la samideanojn, ke ili rigardu en tiu afero ne — kiel ofte bedaŭrinde eĉ inter ni okazas — personajn aferojn, batalon kontraŭ konkurenco, profitejon kaj vantecon, sed la realan, necesan progreson de nia movado.

La orkestro denove ekludas...

Post longa migrado sur dorna la vojo
Minacis nin ondoj de l' maro,
Sed venkis ni ilin kaj velas kun ĝoj!
Al verda haven' de l' homaro.
Post longa batalo, maldolĉa turment'
La atela standardo jam flirtas en veni'!

La ŝipo ekveturas malrapide... majeste! Sur la ferdeko staras gesamideanoj... kaj super ili flirtas standardo.

Al Helsinko! Al Helsinko!

La suno brilas. Kaj sur la vasta blua maro naĝas ŝipo. Ĝi estas la ŝipo de l' homaro. Ĝi portas la flonjn de diversaj nacioj kaj landoj. Ĝi estas malgranda Esperantujo, kiu ĝis nun ne estis, kiu ekzistis ja nur en la revemaj koroj de la Esperantistoj. Kaj la revo fariĝis realo unuan fojon en la jaro 1922! Jen, la ŝipo de l' homaro! Ĝi enhavas la plej fervorajn pionirojn de la verda ideo, la elektitojn de la tuta homaro, la plej noblajn kaj taŭgan frataron, kiu ekzistas en la mondo! Forestas la lingvaj baroj, forestas ĉiuj mokujoj kaj friponoj, forestas ĉia malamo... En Esperantujo regas verda atmosfero! Malproksime de mokemaj homoj... malproksime de malpacemaj nacioj... malproksime de lingvaj bataloj... veturas al la lumo de l' suno la ŝipo de l' vera homaro, nomata „Esperantujo“!

Mi staras ĉe la mara bordo kaj fikse rigardas la malgrandan nigran ĉe la horizonto. La homoj reiris jam en la urbon, kaj nun regas silento...

Kaj mi rigardas, rigardas, ĝis delikata nebulo vualas la nigran...

„Ĉu vi opinias, ke la afero certe sukcesos?“

„Sendube.“

„Kiam ĝi okazos?“

„Precize post du horoj.“

„Vivu Esperanto! Vivu, vivu!“
Mil voĉoj krias, mil manoj salute svingas flagetojn...

